

Eŭropa Bulteno

Septembro-oktobro 2009, № 9-10 (86-87)

RAPORTO PRI DU KUNSIDOJ DE LA LABORGRUPO AKTIVA EŬROPA CIVITANECO

La 11-an de junio kaj la 20-an de oktobro 2009 en Bruselo mi partoprenis kiel reprezentanto de EEU kunvenojn de la laborgrupo Aktiva Eŭropa Civitaneco kadre de la programo „Eŭropo por Civitanoj“. La enkondukan parton de la kunsido ĉiam partoprenas ankaŭ la direktoro de la departemento «Junularo, sporto kaj civitaneco», Ĝeneraldirekcio por Edukado kaj Kulturo (DG EAC) Pierre Mairesse kaj la direktorino de DG EAC Odín Quentin aŭ ŝia anstataŭanto Jan Truszczynski.

Dum la kunsidoj ĉiam pli klare evidentiĝas por ambaŭ flankoj, do por la Eŭropa Komisiono unuflanke kaj la neregistaraj organizoj aliflanke, kiuj estas la plej gravaj punktoj de la kunlaboro. Ĉar temas pri la programo «Eŭropo por Civitanoj» la baza temo ĉiam estas la aktiva eŭropa civitaneco. Ĉiuj organizoj kune provas ellabori la manieron eduki la civitanojn de EU ke ili komprenu sian ne nur nacian sed ankaŭ eŭropan civitanecon, la rajtojn kaj la devojn de eŭropaj civitanoj kaj la ideon de partoprendemokratio kiun celas EU. La malalta procentaĵo de la civitanoj kiuj voĉdonis dum la juniaj balotoj de la Eŭropa Parlamento estas grava montrilo pri multaj faktoj: manko de scioj pri EU, manko da intereso pri la politiko ene de EU kaj pluraj aliaj. La civitanaj organizoj kaj la «pensfabrikoj» kunlaborantaj en la grupo faris plurajn kaj plurnivelajn analizojn pri la partopreno en la elektoj. Tiuj analizoj estas nun bazo por pli detalaj analizoj kaj por novaj strategioj kiel atingi la intereson de Eŭropanoj pri EU ĉar politikistoj mem ne agas tiucele kaj eventuale interesiĝas pri la temo nur por esti elektitaj.

Ĉar momente okazas pluraj gravaj ŝanĝoj en eŭropaj institucioj aperis la ebleco por kunlaborantaj organizoj aktive partopreni en la procezo de la ŝanĝo de la ĉefa financa regularo de EU, ŝanĝota en printempo 2010. Tiaj ŝanĝoj okazas nur malofte kaj estas grava ŝanco por neregistaraj organizoj kunlaborantaj kun la Komisiono klarigi al la koncernaj komisionaj fakuloj kiajn problemojn kaŭzas kelkaj el la severaj financaj reguloj por la subvencioj. Pro tio la grupo decidis prilabori la financan regularon el vidpunkto de subvenciricevantoj kadre de speciala malpli granda laborgrupo pri financoj kiu eklaboris ĉi-oktobre. Mi mem ankaŭ kunlaboras en tiu grupo. Raporto pri la laboro de la grupo estos legebla en iu posta Eŭropa Bulteno kiam ekzistos unuaj rezultoj. Krome la Ĝenerala Direkcio por Edukado kaj Kulturo ĵus decidis lanĉi publikan interretan demandadon pri financaj problemoj kadre de iliaj subvenciprogramoj. La enketo estas lanĉita kaj eblas partopreni ĝis la 18-a de decembro. Estas ankaŭ pluraj esperantaj organizoj kiuj ricevis subvenciojn kaj kiuj povus partopreni en la enketado.

Dua grava punkto estas la kunlaboro de nerigistaraj organizoj en organizado de eŭropaj temaj jaroj: 2010 estas Eŭropa jaro por batalo kontraŭ malriĉeco kaj socia ekskluziviteco, 2011 Eŭropa jaro de volontulado. En la unuaj preparoj por ambaŭ jaroj kunlaboras pluraj organizoj el la grupo kaj ĉar 2010 jam grandskale prepariĝas, dum la junia kunsido ĉeestis ankaŭ kunordigantino por la jaro 2010 de la Ĝenerala Direkcio por Enpostenigoj. Eŭropa jaro de volontulado inciatita de la grupmembroj estis akceptita de la Eŭropa Parlamento la 3-an de junio 2009 kaj devus esti akceptita de la Konsilio dum la nuna sveda prezidado. La Komisiono jam informis la partoprenantojn ke ŝajne la decido estos ĉiuvoĉa en la Konsilio. Pri la preparbuĝeto de 2 milionoj da eŭroj dum 2010 la Parlamento devus decidi ĉi tiun aŭtunon. Tio povus havi influon ankaŭ al la projektalvokoj por neregistaraj organizoj dum la sekva jaro.

Maja Tišljar

KONKLUDOJ PRI E-INSTRUADO POST 10-JARA LABORO KUN NEMOTIVITAJ GEJUNULOJ

Mi havis specialajn cirkonstancojn dum 10 lastaj jaroj (2000-2009), kiuj ebligis al mi labori kiel instruisto kun gejunuloj kiuj malsukcesis en mezgradaj lernejoj. Ĉiujare mi okupiĝis pri nova generacio de tiaj gejunuloj inter 16-kaj 25-jaraĝaj kaj mi proponis ĉiam al ili ankaŭ lernadon de Esperanto, kio ne estis deviga. Mi sukcesis varbi ĉiam inter 6 kaj 8 gejunuloj kiuj poste lernis E-on trifoje semajne po unu horo.

Mia centra problemo estis motivigi ilin por la lernado ĉar mankis por ili komplete iu ajn reala motivo. Ilia centra vivdemando estas kiel havigi monon. Lerni Esperanton efektive neniel kontribuis al tiu vivcelo. Ili malŝatis lernadon ĝenerale kaj havis malbonajn spertojn pri tio kaj ili plej ofte neniam vojaĝis nek sentis bezonon pri vojaĝoj. Ili ankaŭ ne sentis bezonon pri kontaktado de homoj el aliaj landoj kaj kulturoj. Malgraŭ ĉio mi sukcesis ke en ĉiu grupo minimume tri (plej ofte kvar aŭ kvin) faris finekzamenon kaj ricevis konfirmilon pri farita baza ekzameno, kio signifas ke ili atingis proksimume la kapablon A-1 laŭ la oficiala referenckadro eŭropa.



Nun mi pensiiĝis kaj ne plu okupiĝos pri tio, do mi mallonge resumos ĉi tie miajn konkludojn pri E-instruado, ne nur al tiaspecaj junuloj (kiuj bedaŭrinde ne estas malmultaj) sed al ĉiuj.

1. Centra demando por sukcesi en kiu ajn instruado estas la demando de lernmotivoj de la gelernantoj. Infanoj junaj sed ankaŭ granda plimulto de gejunuloj praktike ne havas realajn lernmotivojn. Kial mi lernu? Havi konscion ke tio helpas ilin en la posta vivo ne eblas en tiu aĝo. Veraj lernmotivoj estas tiuj kiuj eliras el la homaj bezonoj mem.

Homoj kiuj havas bezonon vojaĝi kaj ekkoni fremdulojn, posedas tiun motivon, homoj kiuj

havas bezonon ekscii pri diversaj aferoj (scivolemuloj) aŭ deziras kompreni aferojn, posedas tiun motivon. Sed bedaŭrinde malmultaj infanoj kaj ankaŭ plenkreskuloj portas en si tiujn bezonojn, sekve tre malmultaj posedas verajn lernmotivojn.

Kion do fari kun aliaj? Kiel motivigi ilin? Estas nur unu ekstera motivigilo kiu povas movi ilian intereson pri lernado. Atingi sukceson. La homoj sen lernmotivoj kutime ankaŭ ne kapablas multon kaj ne travivas ofte la ĝojon de sukceso. Tiun bezonon ili certe havas. Kaj la sukcesojn en lernado oni povas atingi nur je du manieroj:

- a) per metodoj kiuj uzas malmultan lernmaterialon sed utilan, per kiu eblas tuja lingva praktikado, do sukcesa lingva kreado kaj
- b) per ludoj en kiuj la gelernantoj konkuras kaj sukcesas atingi venkojn, do sukcesojn.

2. Gravega eraro en instruado estas ke oni volas tro rapide instrui multan scion aŭ pro tio ke la instruistojn devigas la lernprogramo aŭ ĉe esperantistoj la fakto ke ili kredas ke E-on oni povas lerni ege rapide. La homoj estas diferencaj kaj iuj vere povas multe pli rapide lerni ol aliaj, sed instrui al grupo signifas instrui al ĉiuj kaj atingi rezultojn ĉe ĉiuj. Pro tio la baza principo devas esti: Ne transiri al sekva leciono antaŭ ol la instruisto certas ke ĉiuj bone regas la antaŭan. Tio signifas ke instruisto devas krei kaj konstrui multajn ekzercojn diversajn por maksimume multe ekzerci kun ĉiuj. Se la instruisto taksas ke por finrego de ĉiuj scioj en la lernata leciono necesas du horoj da ekzercado, li faru tiel. Sed se li vidas ke tio ne sufiĉas, li nepre ellaboru pliajn ekzercojn kaj ekzercu pliajn du horojn.

La unuopajn lecionojn laŭ la lernolibro de Zagreba Metodo gimnazianoj kaj studentoj povas venki en du horoj, sed gejunuloj kiujn mi instruis, bezonis 5-oble pli: 10 horojn. Mi do ne metis antaŭ mi la celon ke ili lernu la tutan lernolibron dum la jaro sed duonon kaj ripetadis la lernadon de la samaj vortoj kaj gramatikaj elementoj tiom longe ĝis mi vidis ke ĉiuj bone regas tion kaj ĝojas pri sukceso.



3. La lingvo ne estas por homoj amuzo sed io per kio oni kontaktas tiujn homojn kiujn ne eblas kontakti en la hejme parolata lingvo. Lerni Esperanton, sen havi verajn, vivajn kontaktojn kun alilandanoj estas afero kiu kondukas al daŭra malmotivigo. "Mi ne bezonas tion, se mi neniam vidas homon kun kiu mi uzus tion." Sekve ĉiu instruisto devus antaŭ ol komenci kurson havi ideon pri vojaĝo al eksterlando en kiu la gelernantoj povos praktiki siajn sciojn. Se tio pro iu ajn kaŭzo ne eblas, oni devas havi vivajn kontaktojn kun ekterlandanoj per interreto. Mi

komence de ĉiu instruado diris al ili ke fine de la lernojaro ni vojaĝos ien (plej ofte al Starsbourgo, kelkfoje al E-aranĝoj de E-junularo) kaj klopodis havi de tempo al tempo eksterlandan gaston (minimume 2-3-foje jare), kun kiu ili povis paroli, starigi demandon kaj vidi ke estas alilandanoj kiuj uzas E-on. Ekzistas multaj homoj kiuj lernetis iom da Esperanto kaj neniam plu okupiĝis pri ĝi. Tiuj neniam revenas. Sed homoj kiuj en sia lernotempo ankaŭ vojaĝis, renkontante iam multe pli poste Esperanton kun ĝojo revenas al la movado. Laste bela ekzemplo pri tio estis la parlamentanino de Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak.

4. Por iu ajn lernado gravas konstanteco kaj reguleco. Mi konstatis ke por sukcesi necesas almenaŭ 3 horoj semajne kaj mi aranĝis tion ke ni havis lecionojn trifoje semajne po 1 horo. Mi konscias ke tio ofte ne estas atingebla, sed tiam la instruisto devus zorgi ke la mankantan konstantecon kaj regulecon li rekomencu per iuspeca hejma laboro kiun li kontrolu rete.

5. Instrumetodoj povas esti diversaj, sed gravas por Esperanto en la komenca fazo (klopodante atingi la bazajn konojn kaj uzkapablon) laŭeble sekvi la principon de vort- kaj gramatiker-ofteco. Tio signifas ke en la unuaj horoj oni lernu nur la plej oftajn morfemojn kiujn baze uzas ĉiu esperantisto kaj poste iom malpli oftajn ktp. Nur tio ebligas ke jam en la unua leciono ili povos krei frazojn mem kaj ĝui en la rapida sukceso. Tiun oftecprincipon bedaŭrinde nuntempe enhavas nur la lernolibro de la Zagreba Metodo. Kaj nur tio estas la avantaĝo de Esperanto: povi akiri en unua fazo ege pli grandajn uzeblecojn ol en aliaj lingvoj. Postaj fazoj ĉiam pli proksimiĝas laŭ malfacileco al aliaj lingvoj.

6. Por la sukceso gravas ankaŭ grandeco de grupo. Ne estas bone se grupo estas malpli ol 5 personoj, ĉar en kazo ke iu mankas la grupo fariĝas tiel eta ke ĝi ne plu atingas normalan grupdinamikon utilan por lernado, sed ankaŭ ne estas bone ke la grupo estas pli ol 10 ĉar tiam malfacilas en malmultaj horoj okupiĝi sufiĉe ofte kun ĉiu unuopulo. Do rekomendinda grupo estas inter 5 kaj 10 personoj.

7. Fine kaj ne plej malgrave: Instruisto devas konscii ke ne ekzistas lernolibro kiu ebligas al li ne prepari sin aparte por ĉiu sekva leciono. La instruisto devas daŭre sekvi la situacion kaj reagi. Se li vidas ke ne sufiĉas du horoj por iu leciono, li uzu pliajn du, sed por tio li mem devas prepari aldonajn materialojn kaj ekzercojn. Do, li devas perdi multan tempon por prepari lecionojn, ekzercojn, ludojn. Unuvorte li ne kredu ke li povas instrui improvizante. Por esti sukcesa instruisto, necesas multhora aldona laboro krom la instruado mem kaj engaĝiĝo pri vojaĝorganizo, homkontaktoj, personaj rilatoj kun lernantoj ktp. Por tio ne multaj havas tempon, sed plej multaj simple ne volas fordoni tiom da sia energio.

Zlatko Tišljar

EEU EN UNIVERSALA KONGRESO

Dum la ĉi-jara UK en Bjalistoko okazis 2-hora kunveno pri "Eŭropa agado", kiun mi gvidis kaj en kiu ni ĉefe sciigis la ĉeestantojn pri la aktivado de EEU en tiu ĉi jaro kaj pri la kongreso en Herzberg.

Du piaj aferoj estas interesaj:

- EEU partoprenis la "movadon foiron" la unuan vesperon, kie Flory, Jozef Reinart kaj mi parolis pri EEU al multege da homoj.
- Dum la tuta UK ni montris tre belan kaj grandan afiŝon pri la onta EEU-kongreso en Irlando 2011. Multege da homoj alparolis min pri tio, kaj menciis ke ili tre ŝatus veni al la urbo Galivo/Gaillimh, ĉar ĝi aspektas aparte bela.



Seán Ó Riain

EEU MEMBRO DE CIVITANSOCIA PLATFORMO POR PROMOCII MULTLINGVISMON

Strukturigita dialogo de EU uzas kiel dialogpartnerojn platformojn de civitansociaj organizoj kune kun la organizita kunlaborsistemo kun la membroŝtatoj. La strukturigita dialogo sur kampoj de edukado kaj trejnado 2010 organiziĝas momente kun la ideo plifortigi multlingvecon en la nova strategia kunlaborkadro post 2010, kiu ĝis nun ne enhavis multlingvecon. La publikaĵo de la Eŭropa Komisiono: «Multlingveco: Riĉeco de Eŭropo kaj komuna prioritato»

(www.ec.europa.eu/education/languages/news/news2853_en.htm) el 2008 antaŭvidas du platformojn por strukturigita dialogo kun interesgrupoj dividitaj laŭ du sektoroj: firmaoj kaj civitansocio. La ĉefa ideo de la Komisiono estas krei forumon por interŝanĝo de bonaj praktikoj de civitansociaj organizoj kaj por kolektado de informoj el kulturo, malformala edukado, la instrusektoro kaj la medioj.

La celoj de la platformo difinitaj de la komisiono (sed ŝanĝeblaj de la platformo mem) estas:

1. komplementi la ekzistantan konsultadprocezon (interretaj konsultadoj, publikaj enketoj ktp.)
2. instigi pli transsektorajn kunlaborojn de organizoj interesigantaj pri lingvopolitiko kaj ilian pli bonan kunordigon je eŭropa nivelo
3. helpi la interesitajn organizojn formuli rekomendojn por kontribui al la evoluo de la politiko pri multlingveco en Eŭropo.

Frue somere 2009 estis publikigita alvoko por organizoj kaj medioj laŭeble eŭroponivelaj kandidatiĝi ĉe la komisiono por tiu ĉi platformo. Meze de oktobro EEU ricevis la inviton partopreni en la platformo kaj raprezentiĝis pere de Seán Ó Riain kaj Maja Tišljár dum la fondkunsido la 23an de oktobro 2009. Entute estis elektitaj 29 organizoj.

La enkondukan paroladon faris la komisionano por multlingvismo Leonard Orban (http://ec.europa.eu/commission_barroso/orban/news/docs/speeches/091023_brussels/091023_civil_society_platform.pdf). La restanta antaŭtagmezo oni pridiskutis ideojn de la Komisiono pri funkciado de la platformo kaj atendataj rezultoj. La membroj elektis prezidanton kaj la sekretariojn de la platformo. La sekretariato iĝis la organizo EUNIC (Eŭropa unio de naciaj kulturinstitutoj) kaj la prezidanto ilia reprezentanto Uwe Mohr kiu posttagmeze transprenis la prezidanton de la kunsido kiun ĝis tiam gvidis la direktoro pri kulturo, multlingvismo kaj komunikado en la Ĝeneraldirekcio Edukado kaj Kulturo Vladimír Šucha. Krome oni pridiskutis la laborsistemon kaj decidis dividi la grupon en laborgrupojn por diversaj temoj. Finfine fondiĝis 4 laborgrupoj pri la sekvaj temoj: (i) edukado, (ii) lingva diverseco kaj socia enkluziviteco, (iii) tradukado kaj terminologio kaj (iv) lingvoplanado. EEU partoprenos en la laboro de ĉiuj laborgrupoj krom tiu pri tradukado kaj terminologio. La platformo devus plulabori memstare kaj nur liveri la rezultojn al la komisiono. La komisiono pluhelpos nur per administrado de la retpaĝo (<http://forums.ec.europa.eu/civil-society-platform/>). La diskutoj kadre de la retpaĝo ne estos publikaj. Nur la publikigitaj dokumentoj kaj informoj en la publika parto de la retpaĝo estos legeblaj por ĉiuj. Krome la komisiono havigos por la platformo la ejon kaj la interpretadon por du plenkunsidoj jare. La celo estas aŭtune 2010 havi pretan dokumenton kun proponoj por la Komisiono. Tiel ĝi povos esti konsiderata de la Komisiono kaj dum la kunlaboro kun la membroŝtatoj preparante la novan generacion de subvenciprogramoj de EU (2014-2020).

La membrarlisto estas trovebla en la oficiala publikaĵo pri la platformofondiĝo publikigita de la Komisiono ĉe http://europa.eu/rapid/kun_referencnumero_IP/09/1574.

Maja Tišljár

PLUA SUBTENO DE EU POR ESPERANTO: GRUNDTVIG-PROJEKTO „ESPERANTO 55+“

Inter la 9-a kaj la 17-a de oktobro okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo unua trejn-seminario por 26 partoprenantoj de la projekto „Esperanto 55+“, kiun finance subtenas Eŭropa Unio (agentejo EACEA), en sia agado por dumviva lernado sub la nomo Grundtvig.

Kadre de tiu ĉi Grundtvig-projekto estis akceptita la du-jara kunlaborplano de 3 partneroj, ellaborita de Pola Esperanto-Asocio (PL), E@I (SK) kaj Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg GEC/ICH (DE). La trilanda projekto por Esperanto-instruado celas instrukapabligon, metodikan trejnadon por instruantoj, kursgvidantoj por la pli maljuna generacio, la t.n. Tria Aĝo (55+). Krom trejnistoj enkadre de la unua Grundtvig-trejnkurso ĉeestis 22 personoj el Pollando kaj 4 kursanoj el Slovakio.

Bona komenco de tiu Grundtvig-projekto estis la partopreno en TORPEDO-5, kiu ĉi-jare ofertis riĉan jubilean programon, en kiu okazis trarigardo de instrumentoj, prezentado de tradiciaj kaj modernaj lernolibroj, instrumaterialoj, renkonto kaj spertinterŝanĝo kun aŭtoroj de lernolibroj, metodikistoj, prezentado de instrufilmoj, registrita instruado, modellecionoj de spertaj gekolegoj.



La tutsemajna instrukapabliga kurso sekvis la skemon de la tradiciaj studsesioj de GEC/ICH kaj enhavis prelegojn pri gramatiko, interlingvistiko, literaturo, movadhistorio, Esperanto-kulturo. Gravan rolon ludis konatiĝo kun diversaj instrumentoj, didaktiko kaj instrupraktiko, kun aparta atento al andragogio, specifaj por instrui plenkreskulojn, pensiulojn, kiuj ankoraŭ ŝatus, povus kleriĝi, akiri novajn sciojn.

La instruado uzas kiel bazan fadenon la 'Manlibron pri instruado de Esperanto' kaj metas en la fokuson la instrumentodon kaj instrumaterialon, ellaboritan de Stano Marček. Kursanoj ricevis la lernolibron 'Esperanto per rekta metodo', kun la KD kun 500 bildkartoj.

Grandan rolon ludas en la trejnado E@I, kiu instruas al la partoprenantoj la uzadon de komputilo por lingvolernado kaj instruado, klarigas la utiligon de teknikajoj kaj la interreto, prezentas la retajn kursojn de lernu.net kaj konsilas ankaŭ pri efika reklamo, varbado por kursoj, por Esperanto.

Trejnistoj kaj prelegantoj dum la unua sesio en Herzberg estis:

Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy (ICH), Katalin Kováts (edukado.net), Stefan MacGill (prezidanto de ILEI), Gerald Tucker (fakestro de Germana Esperanto-Instituto), Lidia Ligeza (Krakovo/Poznano), Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus (E@I).

La EU-subvencio por la realigado de la projektceloj estas uzebla dum 2 jaroj, inter 2009-2011 por projektplanado, preparkunvenoj, organizado de seminarioj, trejnkursoj, reciprokaj vizitoj, akiro de lernolibroj, instrumaterialoj. Je la fino de la dujara instrukapabliga progamo estas planataj ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj akiro de ILEI-atestilo pri instruado de Esperanto.

Sekvaj paŝoj por E@I en la projekto estas ĉefe pretigo de hejmpaĝo, kiu povos bone kovri necesajn bezonojn de la seminarianoj, same kiel de instruistoj, trejnistoj. Ankaŭ estas jam planata venontjara trejnado kaj ekzamenado de partoprenantoj en la projekto.

Peter Baláž



JOMO EN CHIAVARI

La lokaj amaskomunikiloj estis ĝustatempe informitaj kaj pluraj el ili diskonigis la novaĵon kun detaloj, en ĉiu kazo favor-tone. Mallongaj publikaĵoj aperis ankaŭ en la komunuma kaj en la provinca informkajeroj pri kulturaj kaj turismaj okazaĵoj, kaj sur diversaj interretaj paĝoj.

Alvenis proksimume 200-250 personoj, inter kiuj dudeko da esperantistoj. La ĉeestantoj estis plene kontentigitaj: Jomo donis al ili multe pli ol ili imagis. La fina apero de vilaĝana koro kun Trallallero en loka dialekto, akompanata voĉe kaj gitare de JOmO, estis tre plaĉa surprizo por la publiko.

La pri-Esperantaj informoj estis enkondukitaj laŭ taŭgaj dozoj en diversaj formoj:

- La enirantoj ricevis faldfoliojn kun sciigo pri la Eŭropa Tago de la Lingvoj kaj pri JOmO kun bonvenigaj vortoj de la organizantoj.

- Dum la parola enkonduko - fare tre lerte de Cristina de Giorgi - ili aŭdis, interalie, pliajn informojn pri la grupo kaj pri Esperanto.

- JOmO mem alvokis la atenton al la temo anoncanta siajn Esperant-lingvajn kantojn.

- La inform-materialo ricevita de FEI estis je la dispono de interesiĝantoj surtable ĉe la enirejo de la enparka teatrejo.


- Pere de la informiloj estis komunikitaj adresoj, telefon-numeroj kaj diversaj retejoj por laŭvola, plua informiĝo.

Ĵurnalisto venis nur de televid-elsendejo el Rapallo, kiu intervjuis JOmOn kaj du reprezentantojn de nia grupo; sekvis dissendo de 5 minuta programero.

Elisabetta Formaggio

120.000 ARTIKOLOJ EN LA ESPERANTO-VIKIPEDIO

La 15-an de oktobro, la Esperanto-vikipedio atingis 120.000 artikolojn. Nia vikipedio laŭ la nombro de artikoloj nun tenas la 21-an lokon inter la diverslingvaj versioj; la volapukan version oni preterpasis antaŭ kelkaj semajnoj, la 22-an de septembro. La 120.000-a artikolo temas pri Sao Bento do Trairí, eta urbo en norda Brazilo.



Ĉiutage ĉ. 160.000 vizitoj de homoj

La Esperanto-vikipedio ricevas tage ĉ. 160.000 vizitojn de homoj (do sen robotoj). Per tio la Esperanto-vikipedio en aŭgusto okupis la 33-an lokon – iom post la greka kaj slovaka, iom antaŭ la litova kaj serba versioj.

Graveco de la vikipedio

La Esperanto-vikipedio havas pluroblan utilon por la Esperanto-komunumo. Unue ĝi servas kiel leksikono - fakte la unua ĝenerala leksikono dum la ĝisnuna 122-jara historio de Esperantujo. Due per tio ĝi subtenas ankaŭ la terminologian

diskutadon kaj laboron. Trie nia vikipedio tre klare montras al la ekstera mondo, ke Esperanto vivas ĉiutage kaj estas daŭre uzata. La lingvo Esperanto, antaŭ 122 jaroj la plej malgranda lingvo de la mondo, intertempe havas firman lokon inter la 50 plej gravaj lingvoj. Tio videblas krom per vikipedio ankaŭ per pluraj aliaj statistikoj kaj per la uzado en multlingvaj retejoj.

Lu Wunsch-Rolshoven

SIMPOZIO EN KLAGENFURT/CELOVEC PRI ESTONTO DE EU

La 26-an de septembro, do en la Eŭropa tago de lingvoj, mi partoprenis en scienca simpozio de neesperantistaj sociologoj, kiun organizis Instituto por sociologio de Klagenfurta Universitato en Aŭstrio kiel duan parton de projekto organizata kune kun Sociologia Sekcio de Universitato en Zadar (Kroatio). La titolo de la simpozio estis "4th Symposium on European Issues: What will be? - Analysis and visions for Europe" (La 4-a simpozio pri eŭropaj temoj: Kio okazos? - Analizoj kaj vizioj por Eŭropo". Partoprenis ĉefe sociologoj sed ankaŭ juristoj el deko da landoj (Aŭstrio, Kroatio, Slovenio, Hungario, Italio, Francio, Finnlando, Svisio, Pollando, Turko el Bulgario). Kompreneble, la nura laborlingvo estis la angla. Mi pasive regas la anglan kaj ĝenerale bone komprenis preskaŭ ĉiujn krom la francon, kiu parolis tre rapide per tipa franca akcento. La referaĵoj estis interesaj, aparte tiu de sinjorino Gertrud Kendernay el Universitato ELTE de Budapeŝto kiu atentigis pri la fakto ke ĉiuj projekcioj pri estonto kutime prenas kelkajn faktorojn kaj traktas la temon linie - sed ja oni devas konsideri ke ĉiam aperas novaj faktoroj kiuj rompas la linian evoluon kaj sekve prognozi je pli longa periodo ne estas eble. Alia interesa temo estis tiu de turko, studanta en diplomatia lernejo en Triesto, devenanta el turka minoritato en Bulgario Nuri Ali Tahir. Li parolis pri la eventuala rolo de Turkio por EU post kiam ĝi enirus EU-on kaj aparte atentigis ke la najbaroj de Turkio, do estontaj najbaroj de EU, estus Kartvelio, Armenio, Azerbejĝano, Irano, Irako, Sirio, do kelkaj landoj kun ekstremaj islamaj reĝimoj kaj ke Turkio kiu estas 99% islama, tamen sekulara ŝtato, havus gravan rolon por influi tiujn landojn kaj malfermi vojon por komercado kaj paciga pliproksimiĝado. Tiuj landoj havus pli da konfido al Eŭropo, kiu akceptis unu islaman ŝtaton, kaj preferus pli multe kunlabori kun ĝi. Tiel unuflanke Eŭropo malpli fortigus sian timon je islamanoj kaj aliflanke novaj eŭropaj najbaroj per milda politiko de EU kaj pro nehaltigebla influo de demokratio pere de modernaj teknologioj ŝanĝus la staton amikasence. Mi estis la lasta kaj unue mi montris video-filmon "Eŭropo 2050" subtitolitan en la germana, kiu prezentis la nunan E-movadon en kiu diversaj homoj agas kaj vivas en la loknacia lingvo kaj Esperanto samtempe, sed nomis ĝin Eŭropa lingvo, kiel supozo pri la situacio en 2050. La posedo de du lingvoj kaj du kulturoj inter kiuj unu estas loknacia kaj alia reprezentas la komunan kulturon, simulis la eventualan staton en EU se ĝi akceptus E-on. Poste mi prelegis pri la rilato inter lingvo kaj identeco kaj pri neceso evoluigi eŭropan identecon. Mi prelegis germanlingve kaj feliĉe neniu protestis. La diskuto kiu evoluis estis por mi tre instrua. Krom la polo, prof. Jozef Niznik, kiu subtenis la ideon pri Esperanto kiel eŭropa lingvo deklarante tion ideo kun kiu li simpatias, aliaj havis multajn demandojn. Ne estis malamikeco sed demandoj fontanataj aŭ el klasikaj antaŭjuĝoj aŭ vere sciencaj opinioj. Tio kio min aparte mirigis estis ke neniu serioze antaŭe pensis pri neceso evoluigi eŭropan identecon. Du finninoj - kiuj bonege parolis la anglan kaj estis oficistinoj por eŭropaj aferoj, miris pri tio ke oni pensas pri neceso de eŭropa komuna identeco ("Mi ja volas esti nur finnino kiu komunikas ekster Finnlando per la angla"). Kroatoj estis preskaŭ ŝokitaj pro la ideo ke iu volus evoluigi Eŭropan identecon. Ili volas resti kroatoj kiuj volas gajni, sed nenion doni. Mi havis la impreson ke efektive la nuna sociologio tute ne tuŝis la ideon pri neceso evoluigi la komunan identecon, do ke sociologoj ankoraŭ ne tuŝas la tabuan temon - ili studas nur la nacion kiel esence veran socialan bazon kaj tion kio okazas ene de nacio. La ideo pri tio ke lingvo estas ĉefa identecsimbolo kaj ke evoluigi identecon kiel edukadon pri valoroj (eŭropaj valoroj) sen samtempe zorgi pri

identeclingvo kiu esence influas al emocia rilato, ĉu oni akceptas aŭ ne tiun identecon ankaŭ estis por ili nova.

Miaj konkludoj do estas ke sociologio postrestas la politikon. En EU la politikistoj jam sufiĉe longe (kvankam ankoraŭ iom honteme) diskutas pri neceso de ekzisto de eŭropa identeco kaj pri eŭropaj valoroj. Sed ankaŭ ili ankoraŭ ne permesas al si la forigon de la nacia tabuo: por eŭropa identeco nepras identeclingvo kiel ĉefa simbolo kaj neniu socio funkcias sen simboloj kaj ritoj. Sekve, la ideoj de pluraj esperantistoj, kiuj pri tio verkis kaj ekevoluigis teoriojn estas revoluciaj por sociologio. Kaj la simpozio montris ke mi vekis gravan intereson kaj ke plejmulto el ili serioze ekpripensis la temon. Ŝajnas ke la enkonduka filmo komplete ŝanĝis la kutiman reagon kontraŭi Esperanton.

Mia rekomendo: ĉiuj E-fakuloj kaj speciale sciencistoj iru al sociologiaj neesperantistaj aranĝoj kaj proponu siajn tiuspecajn temojn. La filmo kiun mi prezentis estis treege bona enkonduko al posta diskuto. Se estos okazo montri la filmon kaj prelegeti pri simila temo al ĉefoj de EU pri lingva politiko, mi kredas ke tio estus bona ŝanco ekŝanceli iliajn tabuigitajn mensojn. Ankaŭ produkti TTT-paĝaron kun eŭropaj simboloj en 24 lingvoj kaj himno kantata en Esperanto povas esti tre pensiga por sciencistoj kaj altrangaj politikistoj. Ni ne kontraŭstaru sed montru ke ni subtenas la procezon de integriĝado de Eŭropa Unio.

Zlatko Tišljarić

LA 25-AN DE SEPTEMBRO 2009, OKAZE DE LA 150A JUBILEO DE D-RO L.L. ZAMENHOF KAJ OKAZE DE LA EUROPA TAGO DE LA LINGVOJ, ESTIS BELA CEREMONIO EN LA POLA AMBASADO EN KOPENHAGO



Ĉeestis pli ol 50 homoj, kaj la pola ambasadoro, L.E. Adam Halamski, publike parolis pri la laboro de Profesoro Frank en la Universitato de Paderborn, kaj pri la lernfaciligeco pere de Esperanto. Li bonvenigis la gastojn, "aparte Seán Ó Riain, kiu flugis el Bruselo por la ceremonio kaj kiu estas malnova amiko el la periodo kiam li laboris kiel diplomato en Varsovio". Li parolis pole kaj S-ro Stanislaw Mielczarek interpretis Esperanten. S-ino Ileana Schroder, prezidantino de Dana Esperanto-Asocio, bonvenigis la ĉeestantojn, substrekis

la gravecon de la duobla festo kaj dankis ambasadoron Halamski ke li akceptis ŝian proponon. D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU, prelegis pri "L.L. Zamenhof kaj la ĝisnunaj atingoj", kaj deklamis poemon de Kalocsay pri Zamenhof, kies finaj vortoj estas "Ni laŭdu lin, ke aŭdu nin homaro surdemuta". Kim Henriksen, denaskulo de Esperanto, ludis akordeonon kaj kantis polajn popolojn kantojn en Esperanto. Stanislaw Mielczarek deklamis la zamenhofan poemon "La Vojo" en Esperanto, kaj klarigis ĝian signifon pole. La ceremonio finiĝis per la kantado de "La Espero" kaj "La Eŭropa Himno" en Esperanto, en la signifoplenaj vortoj de Umberto Broccatelli.

Seán Ó Riain

ESPERANTO KAJ PIRATAJ PARTIOJ EN EŬROPO

Eble vi jam aŭdis, ke en Germanio la pirata partio unuafoje prezentiĝis ĉe la tutfederaciaj elektoj. Ili atingis 2,0 procentojn kaj per tio estas la plej granda el la partioj sub la 5%-a limo; antaŭ ili do estas nur la konataj partioj: kristandemokratoj (en la du federacilandaj versioj), socialdemokratoj, liberaluloj, maldekstruloj, verduloj.

Ŝajne 13 % inter la viraj unuafojaj elektantoj voĉdonis por ili kaj ili havis ion kiel 9 % en la aĝgrupo inter 18 kaj 24 jaroj. La meza aĝo de la membroj (ĉ. 9000) estas 29, ĉe SPD preskaŭ 60. Iliaj kandidatoj aĝis mezume 32, entute la mezumo estis 47 jaroj.

Unu el la membroj de la tutgermania estraro estas Esperanto-parolanto (Aaron König, kantinto de la muzikgrupo "La Mondanoj", kiu eldonis ankaŭ soloalbumon en 1989 kun la titolo "Aaron brazilumas esperante"). http://eo.wikipedia.org/wiki/Aaron_Koenig. Entute estis almenaŭ kvin Esperanto-parolantoj ĉe ilia elekto-festo en Berlino (eble 300 homoj), almenaŭ du funkciuloj, tria membras. Mi estis tie pro invito de du el miaj komputilistaj amikoj kaj hazarde vidis la kvar aliajn Esperanto-parolantojn tie.

Interese estas, ke ili ne havas kompletan programon.

Mallonge: Ili postulas redukton de patenta juro, ŝanĝon de kopirajto en interreto. En la kampoj de labormerkato, ekonomia kaj socia politiko neniu programa decido. Pri tio sur ilia hejmpaĝo: "Ni volas prezenti nur tion, pri kio ni scias ion, kaj ne ŝajnigi kompetentecojn, kiujn ni ne jam havas."

http://www.focus.de/politik/weitere-meldungen/piratenpartei-der-bundestag-wird-nicht-geentert_aid_439655.html

Konstateblas do, ke oni povas atingi rimarkindan elektan sukceson eĉ kun grandegaj "truoj" en la partia programo.

Mallonge: Sukcesoj jam pli frue. Sveda pirata partio fondita en jan. 2006, atingis 7,1 % ĉe EU-elektoj, unu deputito en Bruselo. Germana partio fondita en sept. 2006. Por unu parlamentano en la urboj de Akeno kaj Münster. Federacilandaj elektoj en Saksio: 1,9 %. Intertempe 9000 membroj, do sepa partio de Germanio laŭ grandeco.

http://www.n-tv.de/politik/politik_wahl_2009/Piratenpartei-muss-abdrehen-article522941.html



Lu Wunsch-Rolshoven

ELSTARA POLITOLOGO UZAS PUBLIKE ESPERANTON

Dum politika publika prelego elstara politologo de TU Dresden uzis Esperanton

Dum la lasta Universala Kongreso mi ricevis multajn materialojn kaj invitojn, interalie partopreni decembre Dresdenajn Maria-Henkel-Kulturtagojn. Kunorganizanto inter aliaj estas TU Dresden kun stampo de Prof. D-ro Werner J.Patzelt. Fine de semajno, ĉar mi estas politike interesita, mi legis en loka gazeto artikoleon "Ĉu la partia ŝtato estas jam ĉe sia fino?" kaj la prelegonto estis anoncita Prof. Patzelt.

La nomo ŝajnis al mi iel konata. Post momento da pripenso mi kompreneble decidis tien veturi por scii ĉu la prelegonto subtenos Esperanton. Post la saluto kaj prezentiĝo alpaŝis simpatia persono kaj tute libere tre sperte prezentis la temon.

Ĉe la fino estis ebleco partopreni en diskutado, do mi prenis la vorton, prezentante la zorgojn de la popolo kaj fine mi menciis Esperanton. Nia preleganto ne estis surprizita, pli bone mi dirus ĝoja kaj tuj salutis min en flua, perfekta Esperanto por miro de la aŭskultantaro. Multaj politikkonsciaj personoj povis aŭdi la internacian lingvon inter ili ankaŭ EU - parlamentano s-ro Robert Hochbaum. Ĉe la fino mi gratulis kaj dankis al la profesoro. Kontentaj ni povis veturi hejmen.



Prof. D-ro Werner
J.Patzelt

Stanislaw Rynduch

VIZITO AL ITALIO

Kadre de la projekto «Interkultura kaj Multlingva Dialogo»
Taglibro de instruisto

Dimanĉon, la 19-an de aprilo 2009 -Survoje al Modeno



Je la 13:20 (hispane 14:20) ni ekflugis el Lisbono al Madrido, kiun ni atingis tuj post la tria kaj duono posttagmeze. Ni restis en la madrida flughaveno dum ĉirkaŭ unu horo. Je pli-malpli la 16-a kaj kvarono ni ekflugis el Madrido al Bolonjo, kie atendus nin la projektaj kunordigantoj s-ro Ermanno Tarracchini kaj s-ino Valeria Bocchini. Fakte ni atingis bolonjan flughavenon je pli-malpli antaŭvidita horo. Tiam ni atingis la italajn

instruistojn, kiuj ĝentile salutis nin kondukinte nin al bus-haltejo kaj stacidomo kie atendis nin niaj hispanaj partneroj el Don Benito kun deko da vojaĝantoj. Modenon ni atingis facile post duonhoru, kaj tuj eniris fervojistan manĝejon por vespermanĝi sufiĉe bonan fiŝaĵon aŭ viandaĵon laŭvole, antaŭ enloĝiĝi en junulara gastejo por fine ripozi ĝis la morgaŭa lundo. Tiam post rapida vizito de la lernejo C. Cavour, ni tagmeze entrajniĝos por atingi la urbon Peskaron.

Lundon, la 20-an de aprilo - Entrajne al Peskaro

Lundon matene, post rapida matenmanĝo je la sama antaŭa manĝloko, ni rapidis al lernejo C. Cavour, nia projekta partnerlernejo. Dum la vizito la lernejoj kortuŝis nin per muziko kaj dancoj, post kiuj per oportuna manĝeto adiaŭis nin antaŭ la trajnvojaĝo al Peskaro. Niaflanke ni omaĝis la lernejon per donacetoj al ĝia vicprezidantino.

Post longa pli ol kvarhora trajnveturado ni atingis stacidomon de Peskaro por duonhore busveturi al Montesilvano, por enhoteliĝi. Urbeto de ĉirkaŭ dudek mil loĝantoj, kie ni restis tri noktojn en tre alloga ĉemarborda hotelo «Grande Adriatico». Tie

atendis nin peskaraj esperantistoj, kiuj antaŭe akceptis nin ĉe la stacidomo. Hotelo ĉarma tamen vundita: la plejmulto de la gastoj estis rifuĝintoj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj urboj pro la tertremo okazinta en ĉi tiu regiono Abruco nur du semajnojn antaŭ nia alveno. Solidareco estis do tio, kion ni povis donaci eĉ se tio tute ne sufiĉis. Tion ni esprimis per komunikado afiŝita sur la muroj esperante kaj itale dirinte: “La esperantistoj de Italio, Hispanio kaj Portugalio, kiuj partoprenas en la projekto «Interkultura kaj multlingva dialogo»... elkore esprimas solidarecon al la loĝantaro de L’Aquila kaj ĝia provinco, trafita tiel kruele de la tertremo”.

Mardon, la 21-an de aprilo - En lernejo Tinozzi kaj en urbodomo

Frue ellitiĝis por frue (je la 8:30) atingi la lernejon Tinozzi en Peskaro. Tamen ne ĉiam eblas akurate plenumi la horaron. Do nur unu horon post la antaŭvidita horo eblis al ni atingi la lernejon, kie s-ino Anna Maria Colacicchi lecionas klason de Esperanto, kiu nin akceptis amikeme kun esperantaj kantoj. Dum ĉirkaŭ du horoj ni interkomunikis prezentinte niajn lernejojn, landojn kaj kantojn. Bone kunrilatiĝis la lernantoj. Ni esperas ke la interkomunika afero daŭru.

Posttagmeze, post tre satigege manĝo (ĉiam la manĝadoj estis tiaj en Peskaro) stariĝis «Lingva

festivalo» estrita de s-ino Luísa Madella, kun kunpartopreno de la s-roj José Salguero kaj Luís Ladeira. Sekvis akcepto en la urbodomo fare de la skabeno pri kulturo kaj mistera homo prezentita kiel «la kandidato por la urbestro». Post kortuŝa akcepto, en kiu Esperanto stele deĵoris, la urboestraro nin regalis per belega orgena koncerto kun kantoj en preĝejo Stella Maris. Ne forgesbla, ne forgesenda, ne forgesinda koncerto direktita de s-ro Mauro Pappagallo. Certe ĝi ankoraŭ eĥas en nia menso ĉu per la fortaj sonoj de la orgeno, ĉu per la alloga voĉo de la kantisto.

La longa, bongusta kaj abunda vespermanĝo finis per kanto «Bondezirojn al vi» honore al psikologino

Alzira Fernandes tiu-tage havinta naskiĝtagon. Kortuŝa evento por aldoni al emocioj de la tuta tago!

Merkredon, la 22-an de aprilo - Surstrate al trabokoj

Merkredo estis malpli-peza ol la antaŭa tago - ĉar ne pluvis. Tamen ni nur profitis la klimatan plibonigon posttagmeze, ĉar la programo ŝanĝiĝis pro tio ke veturi al montaro danĝeras. Dum la mateno okazis E-instruado en la salono de la hotelo. Luísa, Kani kaj Luís prezentis praktikajn ekzemplojn de E-instruado laŭ siaj spertoj.

Post rea abunda kaj bongusta tagmanĝo ni veturis per buso al marbordo de la trabokoj kaj al monaĥejo de sankta Joahano de Venere, unikaj lokoj, la unua pro la originala fiŝkaptarta, kaj la dua pro ĝia mezepoka deveno kaj etoso.

Longa ĉemarborda piedirado permesis al ni digesti la plej abundan (ĉu la plej bongustan? Malfacile decidi!) kaj bongustan vespermanĝon. Tiom abunda ke oni cerbumis pri sufiĉa pravigo por ĝi. Ĉu temas pri tertrema sindromo?! Ĉu subkonscie oni manĝigis nin kiel la lasta manĝo? Ĉu la homoj estis dankemaj pro tio, ke eksterlandanoj ilin vizitis post terura vipo kaj dum skuoriprtiĝo? Ĉu hazarde pro tio, ke la hotelo enloĝiganta multajn rifuĝintojn pro la tertremo ricevis multe da donacoj kaj bezonis rekompenci ilin? Ĉu ĉiuj ĉi hipotezoj kune? Kompreneble, kiu ajn el ili estis, estis ili amikemaj, tucerte!

**Ĵaŭdon, la 23-an de aprilo - Fervoje al Romo**

Tagiĝis sune kaj ni lasis niajn peskarajn amikojn trajndirekte al Romo, kiun ni atingis posttagmeze. Engastiĝo en junulara gastejo Peter Pan tuj pensigis nin pri tio kiom esceptaj estis la hotelkondiĉoj de Peskaro - kvalite kaj preze. Oni povas diri, ke la plej malmultkosta gastejo estis precize la plej altkvalita, tio estas, la «Grande Hotel Adiatico».

Tamen Romo atendis nin per sia klera heroldo s-ro Ranieri Clerici, kiu nin gvidis de la placo Venecio ĝis la priforuma belvidejo per tre klara kaj kleriga ĉiĉeronado. Lasis li sugeston pri manĝloko ĉe la

placo Novona de kiu ni, post sufiĉe satiga pico, eliris por transpasi la Panteonon kaj atingi ravite la lumbrilan, akvosonoran, amasvidatan «Fontana di Trevi». Lacaj, sed plenigitaj ni revenis en gastejon por morgaŭ busveturi tra turismaj romaj (ĉefe romiaj) lokoj.

Vendredon, la 24-an de aprilo - Tra Romo kaj adiaŭo

«Ĉe stacidomo «Roma-Termini» ni tagmanĝis kaj vagadis ĉirkaŭe ĝis la elira horo al flughaveno Fiumicino. Tempo ankoraŭ por viziti la eble plej riĉan - estetike kaj materie - roman preĝejon Sankta Maria Plejgranda. Bela maniero por adiaŭi Romon sendube, kvankam trompaĵo de la flugkompanio Iberia devigis nin resti unu nokton pli ĉe la flughaveno por preni sabate, je la sesa kaj duono, la aviadilon al Portugalio.

Tamen nenia trompaĵo povis elrevigi nin el ĉi tiuj belaj italaj tagoj.

Luís Ladeira

EL TAGLIBRO DE PROJEKTO "ESPERANTO EN LERNEJA SISTEMO"

La 25-an de septembro 2009



Nia projekto startis. Dum la tuta jaro ni preparis unu bonan instruiston kiu agos en urbeto Ruše, instruante tie du klasojn da infanĝardenaj infanoj (5 jaraj) kaj du klasojn da infanoj en unua lernejo de elementa lernejo (6 jarajn infanoj), entute 100 infanoj.

Kun infanĝardena grupo li laboros tage po 20-25 minutoj, kun lernejoj li laboros trifoje semajne po 25-30 minutoj.

Kun infanoj el Maribora lernejo kaj infanĝardeno mi laboros sammaniere, sed la infankonsisto estas iom alia. Mi

havas tri grupojn, unu grupo el 4 jaraj infanoj, dua grupo el 5 jaraj infanoj kaj lerneja grupo el 6 jaraĝuloj, entute 75 infanojn.

La 5-an de oktobro nia projekto startis. Ĝis nun ni preparis nin diversmaniere. Ni tralegis multe, ni serĉis ideojn kaj sciojn de niaj amikoj, sed en la lasta monato ni du horojn tage dediĉis ĝuste al ludoj. Ni ludas, ni diskutas, disputas, kverelas, "ploras"... Serĉante diversajn situaciojn kiuj povas esti dum la tempo kun infanoj. Kolekto da ludiloj kaj ideoj kreskas ĉiutage. Problemo nesolvita estas ankoraŭ financoj, sed tamen ni kredas ke ni solvos ankaŭ tion.

Kunlaboro kun lernejoj kaj infanĝardenoj estas kontentiga. Gepatroj (ĉiuj) montris intereson pri la projekto. En la infanĝardenoj ni promesis fari mallongan kurson por gepatroj. Ni preparos ankaŭ forumon por gepatroj en nia paĝaro, estos pli simple por ili sekvi la disvolvon de la projekto.

Nu, legante tion, ĉu ankaŭ vi havas iun ideon?

La 25-an de oktobro 2009

Ni komencis kaj ni kontentas pri la progreso. Startis ni en ses grupoj. Post unu semajno ni jam havis unuajn impresojn kaj montriĝis ke ni tamen iom malĝuste antaŭvidis disvolvon de la projekto ene de la lernejo kaj la infanĝardeno.

Ni kredis ke estos pli simple kaj pli facile labori kun infanoj pli aĝaj, sed jam post unua semajno ni komprenis ke estas inverse. Infanoj en la infanĝardeno havas nian "lecionon" matene, kiam ili estas ripozitaj kaj povas aktive partopreni en la projekta aktivado. Pli aĝaj infanoj havas niajn "lecionojn" post oficialaj klasoj, kiam ili jam lacas kaj ne plu montras grandan intereson, ĉar ili simple volas kuri ekstere.

La pli junaj infanoj komprenas nian programon kiel ludo, kaj ligas nian esperantumadon al ni, kaj kiel birdetoj matene salutas per "saluton" kaj paroletas esperante, ĉar ili volas proksimiĝi al ni... La pli aĝaj tamen komprenis tion kiel "ankoraŭ io deviga kaj truda".





Ni komprenis ke grandan rolon en nia instruado havas instruistinoj kaj ilia rilato al ni. Kun instruistinoj en la infanĝardeno ni havis kurson junie, mallongan, 6 horan, kaj ili ankaŭ persone ekinteresiĝis. En la lernejo instruistinoj devas fari plian administran laboron post la lecionoj, kaj por ili nia partopreno estas nur plia laboro. Sed nun, post tri semajnoj (mi mem estis intertempe iom malsana kaj ne iris al la infanoj) ili ĉiuj scipovas diri klare : Mi estas knab(in)o, mia nomo estas (*).

Arbo, suno, pluvo, neĝo, aŭto, arbaro, kaŝtano, urso, sciuro, hamstro, leporo, nuboj, kapo, brako, gambo, mano, ombrelo, pilko, ruĝa, griza, flava, blanka, verda, nigra, pluvas, neĝas, saluton, adiaŭ, dankon, bonvolu, kaj plene komprenas la sekvajn frazojn :

"Venu al mi."

"Diru al mi kio estas tio."

"Donu ĝin (montrante al objekto aŭ nomante ĝin) al mi"

"Ĵetu la pilkon al (nomante infanon)".

Infanoj provis instrui al mi la slovenan lingvon, sed ĉar mi senĉese prononcas ion mise (pro kio ili ridegas) ili komprenis ke ne indas perdi tempon kun mi sentalenta kaj ili lernas Esperanton por komuniki kun mi (mi ja ĉiam havas nuksojn kaj ludilojn interesajn).

Por informi gepatrojn pri la progreso de la projekto, ni startigis diskutforumon en www.zvik.org.

Mia kolego, Jernej, pli ludas kun infanoj ekstere, ĉar lia infanĝardeno estas eksterurbe, do tiuj infanoj pli komprenas vortojn.: salti, kuri, ĵeti, krii, bati, frapi...

La interesiĝo ĉe la pli junaj infanoj ĝis nun estis pli granda sed ni penas atingi la saman interesiĝon ĉe la gelernantoj.

Kun ĝojo ni ĉiutage iras al la infanoj kaj kun ĝojo ili akceptas nin. Tio plej gravas.



Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 5-an de novembro 2009.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Maja Tišljarić, Seán Ó Riain, Lu Wunsch-Rolshoven, Luís Ladeira, Elisabetta Formaggio, Stanislaw Rynduch, Peter Baláž, Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.eŭropo.eŭ